

Eŭropa Bulteno

Septembro 2019, Numero 195

NITRO DENOVE GASTIGIS ESPERANTISTOJN



Inter la 12a kaj la 20a de julio gastigis la eks-UK urbo Nitro en Slovakio 164 homojn el 30 landoj, por ke ili partoprenu jam la 13an Someran Esperanto-Studadon. Intertempe SES iĝis la plej granda somera lernejo de Esperanto, kien povas veni plenaj komencantoj kaj jam tre lertaj movadanoj – ĉiu trovos por si taŭgan klasĉambbron. Instruas en SES ĉiam tre sperta internacia teamo de instruistoj – same estis ankaŭ ĉi-foje. Ĉi-jare okazis sep kursoj, inkluzive de tiu pri la Esperanto-literaturo kaj kulturo.

La programo, kiel jam kutime estis bunta kaj samtempe interesa. Krom la antaŭtagmeza intensa studado (de 9h00 ĝis 13h00) posttagmeze okazis prelegoj, metiejoj, ekskursoj, sportumado, paroligaj rondoj, libroservo... La vespera programo ĉefe konsistis el koncertoj, internacia kuirarta festivalo, internacia vespero. Ne povis manki vingustumado (dum la nacia vespero) kune kun la prifesto de la plej vivosperta partoprenantino Maria Dolors el Katalunio, kiu festis en bona sano kun ceteraj samideanoj sian 90-jariĝon! La nokta programo konsistis ĉefe el gufuĵo, drinkejo, diskejo aŭ karaokeo.



SES vere bone enradikiĝis en la movado, ĝi havas sian konstantan kaj bone testitan programon, kiu plaĉas kaj kontentigas la partoprenantaron. Krome ĉi-jare estis unuafoje testita nova “subevento”, kiu okazis kadre de SES, tamen havis sian apartan programon: SEP estis la Somera Esperanto-Programado – aranĝo por programistoj kaj aliaj komputile lertaj esperantistoj, kiuj antaŭtagmeze okupiĝis pri realigo de novaj utilaj projektoj por nia movado. Pli detalan priskribon vidu

en la aparta artikolo.

Kial indas veni al SES?

La kialoj ja povas tre malsami de persono al persono. Sed ĝenerale ja estas kelkaj bonaj kialoj:

- SES estas relative nemultekosta, kaj do taŭga, ekzemple, por homoj el meza kaj orienta Eŭropo
- En SES oni instruas Esperanton dum intensaj kaj profesiaj kursoj
- La instruistoj estas tre lertaj kaj ege kvalitaj
- La etoso estas tre hejmeca kaj amika
- La loko kutime estas tre agrabla, permesanta havi “libertempan humoron”
- La posttagmeza kaj vespera programoj estas tre riĉaj kaj partoprenindaj
- La ekskursoj estas kutime tre allogaj kaj nemultekostaj

Kiam okazos venonta SES? La 18-26an de julio 2020. Kaj kie okazos SES 2020? Verdire, tio ankoraŭ ne klaras – sed eble ĉi-foje ni provos “transpaŝi” la limojn de Slovakio, ironte al Ĉeĥio! Tio tamen ne estas ankoraŭ konfirmita, do atendu sciigon en iu el la venontaj numeroj de La Ondo.

Peter Baláž

El La Ondo de Esperanto

ITALA ESPERANTO KONGRESO EN TRIESTO

Ni, Yoshie kaj Dieter Kleemann, la 4-an fojon povis partopreni Italian Kongreson. Ĉi-foje la kongresa etoso kaj la ege riĉa programo estis elstara - kaj ĉio okazis en, ni diru, ideala pejzaĝo inter maro kaj montoj - kaj en bone situata ekskluziva Kongresejo "Savioa Excelsior Palace".

La Gvidantinoj de la Kongresa Komitato - Michaela Lipari kaj Edvige Tantin Ackermann - plenumis la propran celon: "Ni devas iri al la ekstera mondo por prezenti Esperanton!" La kunorganizado funkciis bone kun la Comune di Trieste. Je la ferma kunsido ni aŭdis, ke la kurso por Komencantoj (Anna Löwenstein) kaj la Kurso por Progresintoj (Dalia Pileckiene) estis tre sukcesaj kaj multnombro vizitataj. Por ni mem speciale interesa estis la Seminario Leonardo, prezentita de Nicola Minnaja kaj Ivan Orsini: 500-jara heredaĵo de Leonardo da Vinci: Ĉu Mona Lisa havas sekretojn? Ĉar ni neniam povis viziti antaŭe la regionon ĉirkaŭ

Trieste ni speciale elektis la riĉan ekskursan programon:

- Lundo: Grottoj San Canziano: Granda spektaklo en la karsta montaro - en la najbarlando Slovenio
 - Mardon: Gemona plus Venzone (Vojaĝo al Mezepoko)
 1. Gemona del Friuli: granda komerca trafikcentro en la 13-a kaj 14-a jarcentoj. Pro konkero de la Venecia Respubliko en 1420 sekvis longdaŭra dekadenco ĝis reaktivado en la 20-a jarcento. 1976 detruita de 2 tertremoj: 6-an de majo kaj 15-an de septembro. Nuntempe rekonstruita uzante la ŝtonojn de la detruitaj konstruaĵoj.
 2. Venzone: ofte okupita de fremdaj potencoj: de Aŭstrio al Venecia Respubliko, de Turkoj al Francoj, poste ree al Aŭstroj ĝis la jaro 1866. Finfine post tria milito por sendependeco la urbeto iĝis itala.
Vidindaĵoj: Katedralo de 1251, Mumioj (14-a ĝis 19-a jarcento)
 - Merkredon: Vojaĝo al 1800-aj jaroj: Gorizia
Inter Italio kaj Slovenio (Oriento-Okcidento) - Kunfluejo de la du valoj de Isonzo (slovene Soĉa) kaj Vipacco (slovene Vipava)
 - 1-a urbeto kiel romi-devena setlejo - oficiale aperis en dokumento en 1001. Ekde tiam Gorizia estis administrata de pluraj familioj sub la patriarkeco de Aquileia: familioj kiuj eniras la historion kiel la "Grafoj de Gorizia". La lasta Grafo de Gorizia forpasis en 1500 en Lienz. Nova posedanto: Habsburga imperiestro Maksimilian I. La urbo estis ĉefurbo de la Provinca Graflando de Gorizia kaj Gradisca.
 - Batalo kampo aŭguste 1916: itala soldataro kontraŭ habsburga soldataro (mortis ca. 100.000 soldatoj (italaj kaj aŭstraj))
 - ekde 1918 Provinco de la Itala Regno
 - post la 2-a mondmilito: en la slovena zono de la urbo estis konstruita la urbo Nova Gorica - (la foirplaco estis en la mezo dividita per strikta landlimo) Fine de la jaro 2007: Eniro de Slovenio al EU: forfalo de la antaŭa landlimo sur la placo! Nun sama urbo: Gorizia + Nova Gorizia
 - Vizito: Kastelo de Gorizia de la 11-a jarcento.
 - Fama iama Loĝanto: Edmondo Halley - eltrovanto de la kometo "Halley"!
 - Alia vizitcelo: la Sinagogo de 1756 - en la areo de malnovgetto. Nuntempe nur kelkaj judaj viroj vivas ĉi-tie.
- Merkredon vespere oni aranĝis belan dancvesperon ĉe la plaĝo por la junularo kaj urbanoj - bona ŝanco por interkonatiĝi!
- Ĵaudon: 29. aŭgusto: Vojaĝo en la Longobarda Epoko
"Cividale del Friuli" Fondo: 53 a.K. Julius Caesar!
Loko: alirejo de la valo de rivero Natisone al la friula ebenaĵo
Situoj: ĉefa kolizia renkontiĝejo de malsamaj civilizoj: alveno al Italio la Longobardoj de Alboino
Cividale estis sidejo de la unua longobarda duklando en 568. La regiono prosperis.
"Civitas" (pro tio nun la nomo "Cividale") - 200 jaroj duklando - fama restaĵo: la Longobarda Templeto. Ekde 720: sidejo de la Patriarko de Aquileia.
Ekde 774 la loko fariĝis Patriarka Feŭdo. Tiam la loko estis administra ĉefurbo de Teokratia Ŝtato.
1420: anekso al la Venecia Respubliko
Ekde 1509 konkerita de Aŭstrio - ekde 1866 Parto de la Itala Regno.
Vidindaĵoj: Katedralo, Longobarda templo, Mezepoka Domo, "Ponto de la Diablo" trans la abismo de la rivero Natisone.

- Vendredon: 30-an de aŭgusto: Ekskurso piede en la centro de Triesto, temo: "Novstila arkitekturo kaj Historiaj Kafejoj"



Komence de la 20-a jarcento: Triesto estis vojkruciĝo de diversaj kulturoj- speciale Itala-Habsburga. Aperis la moderna arto: "Novstilo". Miksaĝo de "Itala florstilo", la secesia el Vieno, la "Jugendstil" el Germanujo. Temas pri la Artisma-Filozofia Movado kun nomo "Liberty" (fine de 1800 - komence de 1900). En Triesto: miksiĝo de palacoj severaj, blankaj, grizaj ("nov-klasikecaj") kaj privataj domoj en la nova artlingvaĝo (kun tipaj flor-ornamaĝoj)

Historiaj Kafejoj: serioza temo en Triesto: "Kafarto" Kunvenejo de artistoj (ekz. franca verkisto Stendhal, irlanda James Joyce, krome triestaj Italo Svevo Umberto Saba). Moto: "Kafejo estas tiu loko, kie oni povas restadi samtempe, kaj en soleco kaj en kompanio".

Yoshie kaj Dieter Kleemann

450 ALIĜINTOJ AL BET-55



Al la 55aj Baltiaj Esperanto-Tagoj, okazintaj la 6-14an de julio 2019 en la urbo Panevėžys (Litovio), aliĝis 450 personoj el 37 landoj – rekorda partoprenantaro en BET post la disfalo de Sovetunio en la 1991a jaro. La antaŭa rekordo estis 334 personoj en BET-52, la antaŭa Litovia BET, okazinta antaŭ tri jaroj en Birštonas.

La plej multaj aliĝintoj estis el la kongreslando Litovio – 142 personoj (31,5% de la BETanaro); sekvas Pollando 69, Koreio 39, Latvio kaj Ruslando 26, Francio 22, Germanio 16, Belgio 11, Hungario kaj Ukrainio 9, Estonio 8, Finnlando kaj Svedio 6,

Ĉeĥio, Hispanio, Luksemburgio, Nepalo 5, Belorusio kaj Ĉinio 4, Israelo, Pakistano, Usono, Uzbekistano 3, Aŭstrio, Bulgario, Danlando, Japanio, Kanado, Norvegio, Svislando 2, Italio, Kazahŝtano, Kubo, Nederlando, Niĝerio, Slovakio, Togolando.

Povilas Jegorovas

LA SEPA ĜRUPO DE STUDENTOJ EN POZNAN

La 7a grupo de interlingvistikaj studentoj atingis sian 3-an jaron en la Universitato Adam Mickiewicz (Poznano, Pollando). 10 partoprenantoj el 9 landoj (Francio, Rusio, Brazilo, Germanio, Usono, Sud-Koreio, Ĉinio, Hispanio kaj Pollando) povis specialiĝi pri instruado aŭ komunikado dum la sesio inter 14-20-a de septembro 2019. Ĉi-lastan gvidis Ilona Koutny kun temoj pri internacia kaj interkultura komunikado instigante diskutojn en la grupo.

Kontribuis al la programo Barbara Pietrzak (PL) pri ĵurnalismo kaj radiofonio; Roman Dobrzyński (PL) pri filmarto ankaŭ kun propraj filmoj prezentantaj esperantan kulturon el sia longa kariero; Istvan Ertl (LU) gvidis seminarion pri literaturo, Nicolau Dols (ES) pri transmeto de literaturaj tekstoj kaj Ida Stria (PL) pri internaciaj helplingvoj.



Al la instruista trejnado (krom la 4 IS-studentoj) aliĝis aldone 12 partoprenantoj el 6 landoj (Meksiko, Pollando, Italio, Francio, Germanio kaj Danio). La specialiĝon gvidis Katalin Kováts, kiu traktis intense kaj interese vastan gamon de temoj pri instruado ekde diversaj

instrumetodoj ĝis instruplanoj. Ŝi prezentis diversajn instruilojn kaj ekzercis la partoprenantojn. Ilona Koutny skizis metodikon kiel instrui fonetikon, leksikon kaj gramatikon elstarigante kelkajn problemajn flankojn de Esperanto, emfazante la instruadon en laŭtemaj kunteksto per komunikada metodo. Al la formado kontribuis per seminarioj ankaŭ Istvan Ertl (LU) pri literaturo kaj Aleksander Korĵenkov (RU) pri movadhistorio. La komuna vespero merkrede donis eblecon al la gestudentoj prezenti sian kulturon: brazilajn kaj polajn kantojn, ritman meksikan muzikon, poemojn kaj anekdotojn. La sesion kompletigas la programo de la kultura festivalo Arkones kun kelkaj aldonaj prelegoj, muziko.

Katalin Kováts

AŬTUNE - KURSOJ, KORUSO, ARTOJ EN GRESILLON

Ni kore invitas vin al: kursaro-staĝo AŬTUNE, de sabato la 26an de oktobro ĝis dimanĉo la 3an de novembro en la fama franca Esperanto-kastelo Greziljono kun programo tro riĉa por povi noti ĉion ĉi-tie. Bonvolu konsulti la retejon en Eo: gresillon.org/autune aŭ france: gresillon.org/automne

Krome, ĉu vi ŝatus pasigi la jarfinon en Greziljono? Informojn pri tio vi trovos sur nia paĝaro.

Berto Schuman

18-a NOVJARA RENKONTIĜO (NR) KAJ 11-A NOVJARA INTERNACIA SEMAJNO (NIS) EN WIESBADEN

Ĝis nun jam 132 homoj aliĝis al la venonta, 18-a Novjara Renkontiĝo (NR) kaj la samtempa kaj samloka 11-a Novjara Internacia Semajno (NIS) en Wiesbaden, iom okcidente de Frankfurto ĉe Majno en Germanio. Pli ol la duono venas el eksterlando, el 15 landoj; aliĝis ĝis nun 39 infanoj kaj junuloj ĝis 19 jaroj.

Dato: 27-a de decembro 2019 ĝis 3-a de januaro 2020 (vendredo ĝis vendredo) Jen listo de aliĝintoj http://esperantoland.org/nr/partoprenantoj_nr18.php

Se ankaŭ vi planas partopreni en NR kaj NIS, ni rekomendas aliĝi baldaŭ. La nuna aliĝperiodo finiĝos en lundo, 30-an de septembro 2019. Se vi ne jam tute certas, eblas antaŭaliĝi per "informpetilo".

Jen la aliĝilo: <http://www.esperantoland.org/nr/alighilo.shtml#alighilo>

Jen la kotizoj: <http://www.esperantoland.org/nr/kotizoj.shtml#plena>

Multflanka programo

Alvenis jam multaj proponoj por programeroj dum la semajno. Kelkaj proponoj certe ankoraŭ iomete ŝanĝiĝos, aldoniĝos aliaj. Jen, kiel ekzemplo, la programo de la kunveno, pasintnovjare http://www.esperantoland.org/dosieroj/NR_18_19_Programo.pdf

Lu Wunsch-Rolshoven

RESUMO DE PRELEGO DE MICHELE GAZOLLA DUM LA TRIESTA KONFERENCO



LINGVA JUSTECO: KIEL TAKSI ĜIN? LA EKZEMPLO DE EŬROPA UNIO

Ĝenerale homoj ne tre konscias pri malegaleco en la lingva kampo, kio tamen abundas. Pensu ekzemple pri minoritatlingvanoj, kiuj ne povas aŭ rajtas uzi sian lingvon en lernejo aŭ en la laborejo; enmigrintoj, kiuj pro lingvaj kialoj malfacile eniras novan socion kaj tie trovas laboron; homoj, kiuj rajtus agi en internacia organizo kie tamen oni postulas denaskan konon de la angla aŭ franca; lernantoj, kiuj ŝatus studi per sia gepatra lingvo, sed tamen devas lerni per lingvo kiun ili ne bone komprenas. Sekve, protektado kaj flegado de lingvoj gravas ne nur kulture. Ĝi gravas antaŭ ĉio praktike, politike kaj ekonomie: temas pri gardi la konkretajn interesojn de la individuoj en la socia, politika kaj ekonomia vivo.

Ĉiuj konsentas, ke en iaj cirkonstancoj uzi ĉiujn lingvojn ne eblas pro praktikaj kialoj, kaj limigo de la uzataj lingvoj foje necesas. Tamen, se en iuj kuntekstoĵ oni akceptas limigon pri uzado de la lingvoj, necesas do enkonduki la principon, ke, al privilegio de iu lingvo kompare al la ceteraj, respondu specifaj kaj precizaj kompensoj (ekzemple, financaj transigoj) favore al la parolantoj de la lingvoj ekskluditaj. Tio estas ĝenerale la principo de lingva justeco kiel aparta formo de socia distribua justeco, kiun elstara esperantista eksprofesoro, nome Jonathan Pool, proponis jam en la 1990aj jaroj. Novaj interpretoj de lingva justeco aldoniĝis en la 2000aj jaroj. La debato iĝas pli kaj pli intensa sed samtempe pli kaj pli konfuza.

Kvankam evidentiĝas, ke ĝenerale lingva justeco kongruas kun la modernaj valoroj de libereco kaj egaleco, oni ankoraŭ relative malmulte scias pri ili. Unu el la kialoj de tiu miskono estas ĝuste, ke ekzistas pluraj kaj foje kontraŭdiraj difinoj de ĝi. Dua kialo estas, ke la koncepto de lingva justeco ankoraŭ ne estas mezurebla. Tiu estas verŝajne la plej grava problemo hodiaŭ, ĉar se oni ne povas taksi lingvajn politikojn en iu difinita lando aŭ regiono

laŭ la principo de lingva justeco, oni ne povas plibonigi la lingvajn politikojn mem kaj la sekve la vivkondiĉojn de la homoj.



La prezento celas precize aliri tiun ĉi problemon. Unue, oni prezentos kaj diskutos la rezultojn de la nuntempa debato pri lingva justeco en la akademia mondo. Due, oni esploros, kiujn trajtojn devus havi aplikebla difino kiu taŭgas por empiria taksado de lingvaj politikoj. Tio signifas, interalie, pripensi kelkajn indikilojn pere de kiuj eblas taksi aŭ mezuri lingvan justecon en iu lando aŭ regiono. Trie, oni proponos unu ekzemplon de taksado de lingva justeco en Eŭropo, baze de statistika datumbazo liverita de Eurostat, la Eŭropinia instituto pri statistiko.

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Pri la enhavo respondecas la aŭtoroj.

Finredaktita: la 30-an de septembro 2019

Redaktoro: Zlatko Tišljar

En la numero kunlaboris: Peter Balaž, Katalin Kováts, Yoshie kaj Dieter Kleemann, Berto Schuman, Lu Wunsch-Rolshoven, Michele Gazolla, Povilas Jegorovas

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

